| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973. |
|---|---|


# MODELA PRONONCO DE LA INTER-LINGVO ESPERANTO


A. Lienhardt
Mühlhouse
Francio


## ENKONDUKO.

Kiam oni aŭdas diversnaciajn homojn paroli en Esperanto, oni konstatas frapajn diferencojn en la prononcado de certaj literoj kaj vortoj. Tiuj diferencoj rezultas certagrade de la kutimo, laŭ kiu homoj parolas en sianacia lingvo kaj, foje, ankaŭ de nekorektaj prononco-manieroj kaj silabo-akcentadoj, fare de malspertaj Esperanto-parolantoj.

Por atingi, ke la prononcado fare de Esperanto-lernantoj estu laŭeble sama kaj belsona en ĉiuj landoj, estas dezirende disponigi al ili "lernilon pri modela prononco", fidinde verkitan laŭ la postuloj de la fonologio.

Ĉi tiu traktaĵo celas servi kiel tia lernilo. Ĝi rezultas, unuflanke, de la reguloj formulitaj en samcelaj verkaĵoj (menciitaj ĉi-poste, ĉe la fino) kaj, aliaflanke, de plur-dek-jaraj spertoj de la verkinto en instruado kaj praktikado de la interlingvo Esperanto.

La ĉi tie prezentita "lernilo pri modela prononco" konsistas el du partoj:

a) Ampleksa kolekto da vortoj, metode vicigitaj, kiuj ebligu al lernantoj ekzerciĝi pri la korekta prononcado, kaj akiri la necesan memfidon por povi flue paroli en la lernata lingvo post relative mallonga tempo;

b) magneta sonbendo (kun la kompleta teksto de la lernilo), havebla ĉe la eldonisto de la broŝuro kaj/aŭ en libroservoj. Ofta aŭskultado de la sonbendo, helpe de konvena magnetofona aparato, konsiderinde faciligas kaj plirapidigas la lernadon de la modela prononco.

Estas necese, ĉi tie, aparte atentigi pri la prononcado de la vokaloj *e* kaj *o* (vidu § 2.8 kaj 2.9) kaj pri la akcentado en vort-kunmentoj konsistantaj el du (aŭ pli ol du) memstaraj vort-elementoj, tio estas: vort-radikoj kaj/aŭ vortoj derivitaj. Koncerne la silabo-akcentadon en vort-kunmetoj, la reguloj formulitaj ĉi-poste diferencas certagrade dis de tiuj menciitaj en PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO 1938, pĝ 20 ĝis 24. Efektive, anstataŭ distingi, unuflanke,

"Ĉef-akcenton" kaj, ali-flanke, "longan (neakcentitan) akcenton", ŝajnas preferinde paroli simple pri *du* akcentoj *pli aŭ malpli fortaj*, same kiel en aliaj lingvoj kun aglutina strukturo. (Vidu § 6. 2). Tamen, la kolizio de du senpere najbaraj akcentoj (vidu §§ 6.2.1.1, 6.2.1.3, 6.2.1.4 kaj 6.2.1.5) riskas ŝoketi, precipe kiam la eliziita litero *o* de la front-elemento finiĝas per vokalo, ekzemple: Dí-servo, genu-kavo, glací-ŝranko, instru-fako, k.s. Tial, en tiaj kazoj, estas rekomendinde *ne* elizii la fin-vokalon *o* de la front-elemento, sed skribi kaj diri: Dío-servo, genuo-kavo, glacío-ŝranko, instruo-fako, kaj tiel plu. En la aliaj paragrafoj, la ko-ekzistado de du akcentoj en unu kaj sama vort-kunmeto estas ne nur bone tolerebla, sed eĉ dezirenda, ĉar parolata Esperanto ja sonu kiel v i v a n t a lingvo.

Restas esprimi la esperon, ke ĉi tiu novspeca lernilo, kaj la rilata sonbendo, efike helpu al kursgvidantoj kaj lernantoj atingi korektan, fluan kaj eŭfonian prononcadon en parolado de la universala interlingvo Esperanto.

## *UNUA PARTO. LITEROJ.*

1.1. La alfabeto de Esperanto konsistas el 5 vokaloj (a, e, i, o, u), unu duon-vokalo (ŭ) kaj 22 konsonantoj. La aboco, laŭ la Fundamento de Esperanto, estas la jena:

*a* bo *co* ĉo *do* e *fo*,
*go* ĝo *ho* ĥo *i* jo *ĵo*,
*ko* lo *mo* no *o* po *ro*,
*so* ŝo *to* u *ŭ* vo *zo*.

1.2. La aboco laŭ d-ro Kalocsay (Plena Gramatiko de Esperanto, 3a eldono), utila en telefonado por ebligi klare distingi la konsonantojn, estas la jena:

*a* be *ce* de *e* ef *ge* ha,
*i* je *ka* el *om* en *o* pa,
*er* es *ta* u *ve* ĉa *ĝe*,
*ĥi* kaj *ĵi*, eŝ *ŭo* kaj *ze*.

## *DUA PARTO. PRONONCO DE LA VOKALOJ.*

2.1. *La vokalo a.* Ekzemploj: la, da, jam, kvar, tra, al; jara (prononcu: ja-ra), mara (pron.: ma-ra), arta (pr.: arr-ta), patra (: pa-tra), brava (: bra-va), praa (: pra-a), akva (:a-kva); amara (: a-ma-ra), afabla (:a-fa-bla), skandala (:skann-da-la), abstrakta (: ab-strak-ta); karnavala (:kar-na-va-la).

2.2. *La vokalo i.* Ekzemploj: mi, vi, li, ni; tri, vin, mil; ili (prononcu: í-li), timi (pron.: tí-mi), diri (pr.: dí-ri), vivi (: ví-vi), spiri (:spí-ri), sibli (:síb-li), dikti (:díkk-ti), distri (:díss-tri), skii (: skí-i); imiti (:i-mí-ti), difini (: di-fí-ni), limigi (: li -mí-gi), kritiki (: kri-tí-ki), signifi (: sig-ní-fi), distingi (: diss-tínn-gi), biciklis (:bi-cí-kliss).

2.3. *La vokaloj a kaj i.* Ekzemploj: ami (: a-mi), bani (:ba-ni), bari (: ba-ri), kanti (: kann-ti), danki (: dann-ki), farti (: farr-ti), fasti (: fass-ti); barakti (: ba-rakk-ti), li balais (: ba-la-iss), vi babilas (: ba-bí-lass), biblia (:bi-blí-a), diabla (: di-a-bla); diafana (: di-a-fa-na), dinamiti (:di-na-mí-ti), didaktika (:di-dak-tí-ka), malamika (:mal-a-mí-ka).



2.4. *La vokalo u.* Ekzemploj: du, dum, kun, nur, sub, sur, plus; unu (:u-nu), ludu (: ludu), pluku (: plu-ku), studu (:stu-du), pruntu (: prunn-tu); murmuru (:murr-mu-ru), gustumu (: guss-tu-mu).

2.5. *La vokaloj a kaj u.* Ekzemploj: agu (:a-gu), kantu (:kann-tu), faru (: fa-ru), fartu (: farr-tu), nula (: nu-la), dua (:du-a), duba (: du-ba), juna (:ju-na), nura (: nu-ra), bruta (: bru-ta, batalu (: ba-ta-lu), balau (: ba-la-u), balaus (: ba-la-uss), vualu (: vu-a-lu), vualus (: vu-a-luss), kultura (: kull-tu-ra), unua (: u-nu-a).

2.6. *La vokaloj i kaj u.* Ekzemploj: ludi (: lu-di), ludis (: lu-diss), fumi (: fu-mi), fulmi (: full-mi), skui (: sku-i), miru (: mí-ru), mirus (: mí-russ), distru (: díss-tru), distrus (:díss-truss); situi (: si-tu-i), situis (: si-tu-iss), nuligi (: nu-lí-gi), nuligu (: nu-lí-gu), ruinigu (: ru-i-ní-gu), ruinigi (: ru-i-ní-gi), ruinigis (: ru-i-ní-giss).

2.7. *La vokaloj a, i kaj u.* Ekzemploj: babilu (: ba-bí-lu), trairu (: tra-í-ru), minuta (: mi-nu-ta), kutima (: ku-tí-ma), kuiras (: ku-í-rass), vuali (:vu-a-li), vualis (: vu-a-liss).

2.8. *La vokalo e.*

a) En ne-fermitaj silaboj (t.e. silaboj, kies lasta litero estas vokalo), la prononco de la vokalo *e* prefere estu malvasta, kiel la franca *é* en "bébé", la germana *e* en "sehr" kaj la angla *e* en "bed". Ekzemploj: ne (: né), se (: sé), tre (: tré), bele (:bé-lé; ne: bê-lê! - vidu la ĉi-sekvan alineon), peze (:pé-zé; ne:pê-zê!), ree (: ré-é), severe (: sé-vé-ré), letere (: lé-té-ré; ne: lê-te-rê!)

b) En fermitaj silaboj (t.e. silaboj, kies lasta litero estas konsonanto), la prononco de la vokalo *e* prefere estu vasta, kiel la franca *ê* en "têt", la angla *e* en "lend" kaj la germana *ä* en "Bär". Ekzemploj: el (: êl), per (:pêrr), sed (: sêd), sen (: sênn), lerta (: lêrr-ta), tendenca (: tênn-dênn-tsa), perfekta (: pêrr-fêkk-ta).

c) Ekzemploj kun la vokalo *e* vaste kaj malvaste prononcata: rekte (: rêkk-té), dense (dênn-sé), feste (: fêss-té); perfekte (: pêrr-fêkk-té), vendrede (: vênn-dré-dé; ne: vênndrê-dê!), intelekte (: inn-té-lêkk-té: ne: inn-tê-lêkk-tê!), inteligente (: inn-té-li-gênn-té; ne: inn-tê-li-gênn-tê!)

2.9. *La vokalo o.*

a) En ne-fermitaj silaboj, la prononco de la vokalo *o* prefere estu malvasta, kiel la franca *o* en "sot", la angla *o* en "obey" kaj la germana *o* en "roh". Ekzemploj: do, po, tro, homo (:ho-mo; ne: hô-mô! - vidu la ĉi-sekvan alineon), tono (:to-no; ne: tô-nô!), polo, troo (: tro-o); koloro (: ko-lo-ro; ne: kô-lô-rô!), komodo (: ko-mo-do; ne: kô-mô-dô!); protokolo (: pro-to-ko-lo; ne: prô-tô-kô-lô!).

b) En fermitaj silaboj, la prononco de la vokalo *o* prefere estu vasta, kiel la franca *ô* en "ô mon Dieu!", la angla *o* en "not" kaj la germana *o* en "Post". Ekzemploj: for (: fôr), por (: pôr), ok (: ôkk), post (: pôsst); mondon (: mônn-dônn), pordon (: pôrr-dônn), dorson (: dôrr-sônn), nombroj (: nômm-brôj; ne: nomm-broĭ!) nombrojn (: nômm-brôjn; ne: nomm-broĭn!).

c) Ekzemploj kun la vokalo *o* prononcata vaste kaj malvaste: homon (: h*o*-mônn), koron (: k*o*-rônn), koroj (: k*o*-rôj, korojn (:k*o*-rôjn), motoron (: mo-t*o*-rônn), doktoron (:dôkk-t*o*-rônn), protokolon (: pro-to-k*o*-lônn), protokolojn (: pro-to-k*o*-lôjn).

2.10 *Komparo de vortoj, laŭ la vokaloj.* Ekzemploj: bano (: b*a*-no), beno (: b*e*-no), bono (: b*o*-no); balo (:b*a*-lo), belo (: b*e*-lo);bulo (:b*u*-lo); paro (: p*a*-ro:, piro (:p*i*-ro), poro (: p*o*-ro; varon (: v*a*-rônn), veron (: v*e*-rônn), (: viron (: v*í*-rônn); kato (: k*a*-to), kanto (: k*a*nn-to); koto (: k*o*-to), konto (: kônn-to); fermi (: fêrr-mi), formi (: fôrr-mi), firma (:f*í*rr-ma); remado (:re-m*a*-do), rimado (: ri-m*a*-do), rimedo (: ri-m*e*-do; rabato (: ra-b*a*-to rebati (: re-b*a*-ti), repeti (:re-p*e*-ti), ripeti (: ri-p*e*-ti); numero (: nu-m*e*-ro), numerojn (: nu-me-rôjn), siropo (: si-r*o*-po ), siropon (: si-r*o*-pônn), heliko (: he-l*í*-ko; ne: hê-l*í*-kô), helikojn (: he-l*í*-kôjn); kreinto (: kre-*í*nn-to), pentinto (: pênn-t*í*-nn-to); alie (: a-l*í*-e), mielo (: mi-*e*-lo), piano (: pi-*a*-no),violo (: vi -*o*-lo), radio (: ra-d*í*-o), religio (:re-li-g*í*-o), historio (: hiss-to-r*í*-o), pedagogio (: pe-da-go-g -o), fizionomio (: fi-zi-o-no-m*í*-o; ne: fiz-jô-nô-m*í*-ĉ!); periodo (: pe-ri- -do), leksikono (: le-ksi-k*o*-no), estas bela vetero (: *e*ss-tass b*e*-la ve-t*e*-ro; ne: bê-la vê-tê-rô!).

2.11. *Diftongoj kun la duon-vokalo u.*

2.11.1. *au.* (Pli facile prononcebla: *â*, meze inter *a* kaj *o*, kiel la angla *a* en "law" kaj la sveda *a* en "Skane".) Ekzemploj: lau (: l*a*o), nau (: n*a*o), nauza (: n*a*o-za), antau (: *a*nn-tao),antauan (: ann-t*ao*-ann), antauajn (: ann-t*ao*-ajn), hodiau (: ho-d*í*-ao), hodiauajn (: ho-di-*ao*-ajn).

2.11.2. *eu.* Ekzemploj: feuda (: f*eu*-da; ne: fôj-da!), Europo (:eur*o*-po; ne: ôj-rô-pô!:, neutrala (: neu-tr*a*-la), leutenanto (:leute-n*a*nn-to).

2.12. *Diftongoj kun la konsonanto j.* Ekzemploj:

2.12.1. aj, kaj, najlo (:n*aj*-lo), fajri (: f*aj*-ri), belaj (: b*é* - laj), najbaro (: naj-b*a*-ro), emajlo (: é-m*aj*-lo), semajno (:sém*aj*-no).

2.12.2. ej, plej, hejmo (: h*éj*-mo; ne: h*aj*-mo!), vejno (v*éj*-no ), mejlo (: m*éj*-lo), kalejdoskopo (: ka-l*éj*-dôss-k*o*-po).

2.12.3. oj, hoj! (: hôj), fojno (: f*ôj*-no), horoj (: h*o*-rôj), horojn (: h*o*-rôjn), bojkoti (bôj-k*o*-ti).

2.12.4. uj, huj!, tuj, prujno (: pr*ūj*-no), kiuj (: k*í*-ūj), kiujn (: k*í*-ūjn), tiuj (: t*í*-ūj), tiujn (: t*í*ūjn), neniuj (: né-n*í*-ūj), neniujn (: ne-n*í*-ūjn).



*TRIA PARTO. PRONONCO DE LA KONSONANTOJ.*

3.1. *b:* bebo (: b*é*-bo), beko (: b*é* -ko), bona (: bo-na), balo (: b*a*-lo); babili (: ba-b*í*-li), babordo (: ba-bôrr-do), bobeno (: bob*é*-no), bubalo (: bu-b*a*-lo), biblioteko (: bi-bli-o-t*é*-ko).

3.2. *c:* caro (: ts*a*-ro), celo (: ts*é*-lo), cerbo (: tsêrr-bo), centro (: tsênn-tro), cindro (: ts*í*nn-dro), laca (: l*a*-tsa), peco (: p*é*-tso), cilindro (: tsi-l*í*nn-dro), karcero (: karr-ts*é*-ro), akcento (: akk-tsênn-to), kuraci (: ku-r*a*-tsi), cigaredo (:tsi-ga-r*é*-do), pacienco (: pa-tsi-ênn-tso).

3.3. *ĉ:* ĉu, ĉapo (: ĉ*a*-po), ĉelo (: ĉ*é*-lo), ĉiu (: ĉ*í*-u), voĉo (:v*o*-ĉo), pinĉi (: p*í*nn-ĉi), aĉeti (: a-ĉ*é*-ti), ĉapelo (: ĉa-p*é*-lo); ĉevalo (:ĉé-v*a*-lo), ĉielo (: ĉi-*é*-lo), riproĉi (: ri-pr*o*-ĉi,sufiĉe (: su-f*í*-ĉé).

3.4. *d:* da, de (: dé), du, des (: dêss), dua (: d*u*-a), doni (: d*o* - ni), devas (: d*é*-vass), diru (:d*í*-ru), pordo (: pôrr-do), apud (: *a*-pud), nadlo (: n*a*-dlo).

3.5. *f:* fi, fama (: f*a*-ma), fino (: f*í*-no), Finno (: f*í*nn-o), flanko (: fl*a*nn-ko), forta (: fôrr-ta), froti (: fr*o*-ti), kofro (:kôffro), sfero (: sf*é*-ro); fadeno (: fa-d*é*-no), infano (: inn-f*a*-no) emfazi (: êmm-f*a*-zi).

3.6. *g:* gaja (:g*aj*-a), gusto (: g*u*ss-to), gloro (: gl*o*-ro), granda (: gr*a*nn-da), lago (: l*a*-go), dogmo (: dôgg-mo), lingvo (:l*í*nn-gvo); germana ( gêrr-m*a*-na), rigardi (: ri-g*a*rr-di), forgesi (: fôrr-g*é*-ssi), agnoski (: a-gnôss-ki).

3.7. *ĝ:* ĝi, ĝis (: ĝiss), ĝeni (:ĝ*é*-ni), leĝo (: l*é*-ĝo), kaĝo (:k*a*-ĝo), ĝuste (: ĝ*u*ss-té), ĝojis (: ĝ*oj* -iss), sonĝis (: ssônn-ĝiss), ĝentila (: ĝênn-t*í*-la), ĝardeno (: ĝarr-d*é*-no), anĝelo (: ann-ĝ*é*-lo), arĝento (: arr-ĝênn-to), ruĝiĝas (: ru-ĝ*í*-ĝass), ĝenerala (: ĝé-né-r*a*-la), inĝeniero (: inn-ĝé-ni-*é*-ro; ne: inn-ĝenn-jê-rô!).

3.8. *h:* ha, homo (: h*o*-mo), havi (: h*a*-vi), hundo (: h*u*nn-do), hirta (: h*í*rr-ta), hejme (: h*éj*-mé), harpo (: h*a*rr-po); haveno (: hav*é*-no), heliko (: hé-l*í*-ko), hirundo (: hi-r*u*nn-do ), haladzo (: ha-l*a*-dzo), honesta (: ho-nêss-ta), higiene (: hi-gi-*é*-né ), histriono (: hiss-tri-*o*-no), hiperboloido (: hi-pêrr-bo-lo-*í*-do) homeopatio (: ho-me-o-pa-t*í*-o).

3.9. *ĥ:* eĥo (: *é*-ĥo), ĉeĥa (: ĉ*é*-ĥa), ĥoro (: ĥ*o*-ro; paroĥo (: par*o*-ĥo), ĥolero (: ĥo-l*é*-ro), ĥaoso (: ĥa-*o*-sso), ĥirurgo (: ĥir*u*rr-to), arĥaismo (: arr-ĥa-*í*ss-mo).

3.10. *j:* ja, jam (: jamm), jes (: jêss), kaj; jako (: j*a*-ko), kajo (: k*aj*-o), jodo (: j*o*-do), jaro (: j*a*-ro), juĝi (: j*u*-ĝi); kajero (: kaj-*é*-ro), jahurto (: ja-h*u*rr-to), jasmeno (: jass-m*é*-no), konjekti (: konn-jêkk-ti), januaro (: ja-nu-*a*-ro), injektoro (: inn-jêkk-t*o*-ro).

3.11. *ĵ:* ĵus, ĵeti (: ĵ*é*-ti), aĵo, ĵuris (: ĵ*u*-riss), ĵaŭde (:ĵ*aŭ* -dé), ĵongli (: ĵônn-gli), ĵaluza (: ĵa-l*u*-za), ĵokeo (: ĵo-k*é*-o), deĵori (: dé-ĵ*o*-ri), supraĵo (: su-pr*a*-ĵo).

3.12. *k:* ké (: ké), kaj, kun (: kunn), ok (: ôkk), dek (: dêkk),
kvar; kelo (: ké-lo), knabo (: kna-bo), akno (: a-kno), ankaŭ
(: ann-kaŭ), sankta (: sannk-ta); kaliko (: ka-lí-ko), kolekti
(: ko-lêkk-ti), biciklo (: bi-cí-klo).

3.13. *l:* la, li, al (: all), el (: êll), ledo (: lé-do), lerta (: lê-
rr-ta), lordo (: lôrr-do), klara (: kla-ra), plano (: pla-no),
slipo (: slí-po), kulpo (: kull-po), valso (: vall-so), kial
(: kí-all), tiel (: tí-êll), neniel(: né-ní-êll), ellabori (:ell-
la-bo-ri).

3.14. *m:* mi, mem (: mêmm), dum, jam (: jamm), mano (: ma-no), mondo
(: mônn-do), tiam (: tí-amm), tamen (: ta-mênn), bremsi (:brêmm-
-ssi ), rompis (: rômm-piss), tombo (: tômm-bo), frenda (:frêmm-
da), kamelo (: ka-mé-lo), lamenti (: la-mênn-ti ), komforta
(: kômm-fôrr-ta), ĉambelano (: ĉamm-bé-la-no), sammaniere (: sam-
ma-ni-é-ré).

3.15. *n:* ne (: né), ni, nin (: ninn), nun (: nunn), kun (: kunn ),
kvin (: kvinn), novan (: no-vann), landon (: lann-dônn).

3.16. *p:* po, por (: pôr), pli, pri, sep (: sêpp); pano (: pa-no ),
sapo (: sa-po), pepi (: pé-pi), pendi (: pênn-di),plumbo (: plu-
mm-bo), papero (: pa-pé-ro), papuo (: pa-pu-o), papriko (: pa-
prí-ko), pasporto (: pass-pôrr-to), prospera (: prôss-pé-ra ),
papilio (: pa-pi-lí-o).

3.17. *r:* re (: ré), tre (: tré), per (: pêrr), ree (: ré-é), regi
(: ré-gi), resti (: rêss-ti), rapiro (: ra-pí-ro), rekordo (:re-
-kôrr-do), rekruto (: ré-kru-to), rektoro (: rêkk-to-ro), ri-
verenco (: ri-vé-rênn-co), restoracio (: rêss-to-ra-cí-o).

3.18. *s:* si, sin (: sinn), ses (: sêss), sur, ĝis (: ĝiss ), ĵus
(: ĵuss), estas (: êss-tass), segas (: sé-gass), scias (: scí-
ass), pensis (: pênn-siss), skismo (: skíss-mo), sfinkso(:sfí-
nn-kso), smirgis (: smírr-giss), substanco (: subb-stann-co),
statistiko (: sta-tiss-tí-ko), sensacia (: sênn-ssa-cí-a), sa-
ksofono (: sa-kso-fo-no).

3.19. *ŝ:* ŝi, ŝian (: ŝi-ann), ŝafo (: ŝa-fo), kaŝi (: ka-ŝi), buŝo
(: bu-ŝo), ŝultro (: ŝull-tro), ŝanĝi (: ŝann-ĝi),ŝteli (: ŝté-
li), ŝranko (: ŝrann-ko), ŝtrumpo (: ŝtrumm-po), ŝerci (: ŝerr-
ci), ŝprucis (: ŝpru-ciss), ŝablono (: ŝa-blô-no); ŝanceli
(: ŝann-cé-li), tapiŝo (: ta-pí-ŝo), paŝtisto (: paŝ-tíss-to).

3.20. *t:* tre (: tré), tro, cent (: cênnt), post (: pôsst),teo (:té-
o, ne: tê-ô!), tiu (: tí-u), tute (:tu-té), tedi (: té-di),te-
ndo (: tênn-do), tenti (: tênn-ti), teatro (: té-a-tro), tur-
mento (: turr-mênn-to), kotleto (:kôtt-lé-to), terakoto (: té-
ra-ko-to), tetraedro (: té-tra-é-dro).

3.21. *v:* ve (:vé), vi, vin (:vinn), vivu (ví-vu), vazo (: va-zo ),
vero, (: vé-ro), ventro (: vênn-tro), vortoj (: vôrr-tôj), po-
lvo (: pôll-vo), ŝviti (: ŝví-ti), lingvoj (: línn-gvoj).

3.22. *z:* zono (: zo-no), zebro (: zé-bro), zinko (: zínn-ko), edzo
(: é-dzo), zumas (: zu-mass), zenito (: zé-ní-to), zibelo(:zi-
bé-lo), zigzago (: zig-zag-o), edzino (: é-dzí-no), zoologo
(: zo-o-lo-go), zoologio (: zo-o-lo-gí-o).



## *KVARA PARTO. VORTOJ KUN SIMILAJ KONSONANTOJ.*

4.1. *b* kaj *p:* bano, pano; beno (: bé-no), peno (pé-no), bendo (:bê-
nn-do), pento (: pênn-to), bunta (: bunn-ta), punto (: punn -
to), baro, paro, blanka, planko; korbo, korpo, (: kôrr-po).

4.2. *d* kaj *t:* diri, tiri; drinki (: drínn-ki), trinki; dono, tono;
daŭro, taŭro; bedo, beto; nodo, noto; dento (: dênn-to), tento
(: tênn-to), tendo (: tên-do); atendi (: a-tênn-di), atenti.

4.3. *g* kaj *k:* gaso (: ga-sso), kaso; glavo, klavo; grio, krio; fa-
go, fako; sago, sako; plugis, plukis; agordi (:a-gôrr-di),ako-
rdi (: a-kôrr-di).

4.4. *m* kaj *n:* mapo, napo; mura, nura; migre, nigre; komo, kono;ki-
om, kion; samo, sano; sumo, suno; amaro, anaro.

4.5. *s* kaj *z:* mezo, meso; zono, sono; zumo, sumo; rozo, roso;ruza,
rusa; rezoni, resoni.

4.6. *s* kaj *ŝ:* sako, ŝako; salo, ŝalo; samo, ŝamo; sati, ŝati;selo,
ŝelo; stato, ŝtato; sia, ŝia; kaso, kaŝo.

4.7. *ŝ* kaj *ĉ* ŝamo, ĉamo; ŝelo, ĉelo; ŝia, ĉia; ŝerci, serĉi.

4.8. *ĉ* kaj *ĝ* ĉi, ĝi; ĉia, ĝia; kaĉo, kaĝo; ĉano, ĝeno (: ĝé-no).

4.9. *ĝ* kaj *ĵ* aĵo, aĝo; etaĵo, etaĝo; ĵus, ĝusta.

## *KVINA PARTO. KONSONANTO-DUOPOJ.*

5.1. *dz:* edzo (:é-dzo), edzino (: é-dzí-no), haladzo (: ha-la-dzo).

5.2. *kc:* sekci (: sêkk-ci), akcio (: akk-cí-o), akcipitro (: ak-ci-
pí-tro).

5.3. *kz:* ekzisti (: e-kzíss-ti), ekzerci (: é-kzêrr-ci),ekzemplero.

5.4. *ks:* vakso, fiksi, kokso, nukso, borakso, ampleksa, eksplodi,eks-
kurso, eksciti, ekskluziva, krucifikso, ksilofono.

5.5. *sc:* scias (: scí-ass), scii (: scí-i), scienco (: sci-ênn-co )
escepto (: êss-cêpp-to), oscedis (: ôss-cé-diss).

## *SESA PARTO. LA SILABO-AKCENTADO.*

Laŭ la regulo nº10 en la Fundamento de Esperanto, la vort-akce-
nto troviĝas ĉiam sur la antaŭ-lasta silabo.

6.1. *La akcentado en radik-vortoj kaj drivitaj vortoj.*

6.1.1. *Du-silabaj vortoj.* Prononco-skemo: *A n.* (A = akcentita si-
labo; n = ne-akcentita silabo.) Ekzemploj: ami, danko, hejme,
juĝo, mondo (: mônn-do), pensi (: pênn-si), super (: su-pêr;ne:
supr!), tamen (: ta-mênn; ne: tamn!)

6.1.2. *Tri-silabaj vortoj.* Prononco-skemo: *n A n* . Ekzemploj: ab-
elo, enui, informo (: inn-fôrr-mo; ne: ínn-formo!), radio (:ra-
dí-o; ne: ra-djo!), amínda, bakísto, dormema, manĝejo.

6.1.3. *Kvar-silabaj vortoj.* Prononco-skemo: *n n A n* . Ekzemploj :
akapari, kontribui, pozicio, romantika (: ro-mann-tí-ka; ne: ro-
mann-tika!), ekzercadi, lernejestro, manĝilaro, pianisto (: pi-
a-níss-to; ne: pja-níss-to!).

6.2.1.2. Ekzemploj kun *unu*-silaba *front*-elemento. Prononco-skemo:

*A - A n.*

du-hora, tri-hora; kun-kulpa, sen-kulpa; ne-plena, plen-plena; dek-milo, cent-milo; tra-kuri, post-kuri; for-fali, sub-fali; per-forta, tro-forta; kun-porti, sur-porti; cent-foje, mil-foje; for-iri, plu-iri, post-iri; dum-tage, po-tage; laŭ-moda, ne-moda, nun-moda; krom-tasko; mem-fido; plen-buŝo; prim-nombro; sen-honta; sin-garda; sub-jupo; trans-mara.

6.2.1.3. Ekzemploj kun *tri*-silaba *front*-elemento, sen aŭ kun elizio. Prononco-skemoj: *n A n - A n* kaj *a A' - A n.*

abelo-svarmo, abel-svarmo; aero-premo, aer-premo; aero-spaco, aer-spaco; afero-plena, afer-plena; alia-flanke, ali-flanke; alia-lingva; ali-lingva; angulo-meblo, angul-meblo; atomo-kerno, atom-kerno; atomo-pezo, atom-pezo; baloto-rajto, balot-rajto; barelo-fundo, barel-fundo; biblio-horo, bibli-horo; biero-glaso, bier-glaso; botelo-vino, botel-vino; bovaĵo-supo, bovaĵ-supo, bovido-kapo, bovid-kapo; butono-truo, buton-truo; butono-floro, buton-floro; butero-bulko, buter-bulko; butero-pano, buter-pano; citrono-suko, citron-suko; ĉevalo-povo, ĉeval-povo; ĉielo-bluo, ĉiel-bluo; doloro-sento, dolor-sento; eduko-manko, eduk-manko; eduko-arto, eduk-arto; espero-dona, esper-dona; espero-plena, esper-plena; fabriko-marko, fabrik-marko; folio-rando, foli-rando; genuo-kavo, genu-kavo; glacio-ŝranko, glaci-ŝranko; ĝardeno-floroj, ĝarden-floroj; honoro-gasto, honor-gasto; imagi-pova, imag-pova; infano-ludoj, infan-ludoj; influo-sfero, influ-sfero; instruo-fako, instru-fako; invento-febro, invent-febro; junio-tagoj, juni-tagoj; kalkulo-libro, kalkul-libro; konono-tubo, kanon-tubo; kareso-gesto, kares-gesto; koloro-ŝanĝo, kolor-ŝanĝo; komune-uza, komun-uza; konstruo-planoj, konstru-planoj; kontakto-lenso, kontakt-lenso; kontoro-ĉefo, kontor-ĉefo; kontrolo-iro, kontrol-iro; kopio-rajto, kopi-rajto; kuiro-forno, kuir-forno; kulturo-honto, kultur-honto; kupeo-pordo, kupe-pordo; kuraco-loko, kurac-loko; laboro-daŭro, labor-daŭro; lanterno-fosto, lantern-fosto; latuno-drato, latun-drato; leono-dento, leon-dento; letero-kesto, leter-kesto; libero-tempo, liber-tempo; linio-ŝipo, lini-ŝipo; magneto-forto, magnet-forto; martelo-bato, martel-bato; mezuro-bendo, mezur-bendo; mielo-kuko, miel-kuko; migdalo-arbo, migdal-arbo; milito-fino, milit-fino; motoro-bruo, motor-bruo; muziko-festo, muzik-festo; nacia-lingva, naci-lingva; naskiĝo-dato, naskiĝ-dato; nutraĵo-manko, nutraĵ-manko; odoro-salo, odor-salo; okulo-vitroj, okul-vitroj; oleo-plantoj, ole-plantoj; opero-kanto, oper-kanto; orelo-ringoj, orel-ringoj; orgeno-tuboj, orgen-tuboj; ornamo-arto, ornam-arto; papago-beko, papag-beko; papero-korbo, paper-korbo; parado-marŝo, parad-marŝo; pardono-peto, pardon-peto; parolo-turno, parol-turno; pasio-plena, pasi-plena; patento-rajto, patent-rajto; patrolo-ŝipo, patrol-ŝipo; petrolo-fonto, petrol-fonto; piano-ludo, pian-ludo; piedo-pilko, pied-pilko; platano-trunko, platan-trunko; prediko-libro, predik-libro; provizo-kvanto, proviz-kvanto; rapido-trajno, rapid-trajno; respondo-rajto, respond-rajto; rezisto-povo, rezist-povo; ripozo-tago, ripoz-tago; rivero-bordo, river-bordo; saluto-gesto, salut-gesto; scienco-fako, scienc-fako; semajno-fino, semajn-fino;



seruro-truo, serur-truo; severa-more, sever-more; sigelo-vakso, sigel-vakso; signalo-disko, signal-disko; silabo-nombro, silab-nombro; simio-kaĝo, simi-kaĝo; skandalo-franda, skandal-franda; skrupulo-manko, skrupul-manko; soldato-hejmo, soldat-hejmo; somero-nokto, somer-nokto; spegulo-bildo, spegul-bildo, spindelo-forma, spindel-forma; spirito-stato, spirit-stato; sukero-peco, suker-peco; stacio-ĉefo, staci-ĉefo; stacio-domo, staci-domo; stomako-poŝo, stomak-poŝo; sukero-kano, suker-kano; ŝoseo-mezo, ŝose-mezo; tamburo-felo, tambur-felo; tibio-karno; tibi-karno; trafiko-taŭga, trafik-taŭga; turbino-rado, turbin-rado; vagono-ŝarĝo, vagon-ŝarĝo; vaporo-bano, vapor-bano; vespero-manĝo, vesper-manĝo; vizito-karto, vizit-karto; vualo-ŝtofo, vual-ŝtofo;

6.2.1.4. Ekzemploj kun *kvar* -silaba *front*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n A n - A n* kaj *n n A' - A n.*

akurata-hore, akurat-hore; almanako-pąĝo, almanak-paĝo; ananaso-torto, ananas-torto; delikata-senta, delikat-senta; distribuo-tago, distribu-tago; garantio-sumo, garanti-sumo; geedziĝo-festo, geedziĝ-festo; industrio-centro, industri-centro; inspektoro-voĉe, inspektor-voĉe; intereso-sfero, interes-sfero; kolektivo-verko, kolektiv-verko; komedio-sceno, komedi-sceno; krokodilo-larmoj, krokodil-larmoj; memuaro-parto, memuar-parto; meteoro-ŝtono, meteor-ŝtono; mirabelo-brando, mirabel-brando; omnibuso-pordo, omnibus-pordo; oratoro-arto, orator-arto; pacienco-ludo, pacienc-ludo; pantalono-poŝo, pantalon-poŝo; papilio-flugo, papili-flugo; perspektivo-bildo, perspektiv-bildo; piramido-pinto, piramid-pinto; probableco-graďo, probablec-grado; rozario-dekoj, rozari-dekoj; sedimento-provo, sediment-provo; sonorilo-turo, sonoril-turo; telefono-libro, telefon-libro; telegramo-kodo, telegram-kodo; tualeto-sapo, tualet-sapo.

6.2.1.5. Ekzemploj kun *kvin*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n n A n - A n* kaj *n n n A' - A n.*

aluminio-drato, alumini-drato; amoniako-salo, amoniak-salo; ceremonio-preta, ceremoni-preta; internacia-lingve, internaci-lingve; konversacio-temo, konversaci-temo; literaturo-tago, literatur-tago; materialo-provo, material-provo; manufakturo-varoj, manufaktur-varoj; restoracio-mastro, restoraci-mastro; situacio-ŝanĝo, situaci-ŝanĝo.

6.2.2. Vort-kunmetoj kun *tri*-silaba *post*-elemento.

6.2.2.1. Ekzemploj kun *du*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *A n - n A n* kaj *A' - n A n.*

amo-doloro, am-doloro; bero-arbusto, ber-arbusto; bano-sezono, ban-sezono; besto-bredado, best-bredado; blanka-kolora, blank-kolora; bovo-rostaĵo, bov-rostaĵo; danco-kunulo, danc-kunulo; danci-kapabla, danc-kapabla; Dio-patrino, Di-patrino; dika-ventrulo, dik-ventrulo; fako-gazeto, fak-gazeto; farbo-krajono, farb-krajono; fero-fadeno, fer-fadeno; festo-kunveno, fest-kunveno; filmo-teatro, film-teatro; firma-piede, firm-piede; flava-aspekta, flav-aspekta; floro-varmejo, flor-varmejo;

flugo-distanco, flug-distanco; frago-sirupo, frag-sirupo;
fulmo-rapide, fulm-rapide; fumi-salono, fum-salono;
gaso-fabriko, gas-fabriko; globo-krajono, glob-krajono;
graso-makulo, gras-makulo; greno-provizo, gren-provizo;
gusto-eraro, gust-eraro; gvido-folio, gvid-folio;
hejmo-sidema, hejm-sidema; homo-amaso, hom-amaso;
juĝo-decido, juĝ-decido; kapo-kuseno, kap-kuseno;
koro-malsano, kor-malsano; korpo-varmeco, korp-varmeco;
kremo-butiko, krem-butiko; Kristo-naskiĝo, Krist-naskiĝo;
kulpo-atesto, kulp-atesto; lano-tondado, lan-tondado;
lasta-momente, last-momente; ligo-streketo, lig-streketo;
lipo-anguloj, lip-anguloj; lito-vagono, lit-vagono;
lumo-signaloj, lum-signaloj; luno-surfaco, lun-surfaco;
mano-laboro, man-laboro; maro-leono, mar-leono;
mono-afero, mon-afero; mondo-milito, mond-milito;
naĝo-veziko, naĝ-veziko; nazo-kataro, naz-kataro;
neĝo-kovrita, neĝ-kovrita; nomo-indiko, nom-indiko;
nubo-kastelo, nub-kastelo; nuda-okule, nud-okule;
nuko-ŝirmilo, nuk-ŝirmilo; oro-monero, or-monero;
paco-movado, pac-movado; pafo-linio, paf-linio;
pagi-kapabla, pag-kapabla; pano-farado, pan-farado;
pensi-kapabla, pens-kapabla; perlo-fiŝejo, perl-fiŝejo;
pino-arbaro, pin-arbaro; plumo-eraro, plum-eraro;
pluvo-mantelo, pluv-mantelo; pordo-frapilo, pord-frapilo;
poŝo-tranĉilo, poŝ-tranĉilo; poŝto-mandato, poŝt-mandato;
poto-lekulo, pot-lekulo; premo-butono, prem-butono;
preso-litero, pres-litero; prezo-indiko; prez-indiko,
puno-laboro, pun-laboro; ribo-likvoro, rib-likvoro;
roko-grimpulo, rok-grimpulo; ronde-iranto, rond-iranto;
rozo-kolora, roz-kolora; ruĝa-tegola, tuĝ-tegola;
salo-minejo, sal-minejo; sango-kolbaso, sang-kolbaso;
sapo-farejo, sap-farejo; savo-armeo, sav-armeo;
semo-vendisto, sem-vendisto; silko-fadeno, silk-fadeno;
skio-bastono, ski-bastono; skribo-maŝino, skrib-maŝino;
sobre-aspekta, sobr-aspekta; sono-efektoj, son-efektoj;
stelo-figuro, stel-figuro; strato-komenco, strat-komenco;
supo-bovaĵo, sup-bovaĵo; super-natura, supren-irado;
suno-horloĝo, sun-horloĝo; ŝafo-viando, ŝaf-viando;
ŝako-ludantoj, ŝak-ludantoj; ŝaŭmo-kulero, ŝaŭm-kulero;
ŝipo-ĵurnalo, ŝip-ĵurnalo; tago-laboro, tag-laboro;
teo-salono, te-salono; tero-etaĝe, ter-etaĝe;
tono-alteco, ton-alteco; trinko-fontano, trink-fontano;
vakso-kandelo, vaks-kandelo; vino-botelo, vin-botelo;
vivi-kapabla, viv-kapabla; vorto-kunmeto, vort-kunmeto;

6.2.2.2. Ekzemploj kun *unu*-silaba *f r o n t*-elemento. Prononco-skemo: *A - n A n*.

du-silaba, tri-silaba; dum-vojaĝa; kun-veturi, for-veturi; ĝis-mortige; krom-persono; laŭ-mezure, mem-estimo; mis-informi; ne-konata; ne-taŭgulo; pli-grandigi, plu-veturi; por-informe; post-kolero; pro-deĵore; sen-mezura; sur-genue; ses-angula.



6.2.2.3. Ekzemploj kun *tri*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n A n - n A n* kaj *n A' - n A n*.

abelo-reĝino, abel-reĝino; alarmo-signalo, alarm-signalo;
akcio-valoro, akci-valoro; alia-landano, ali-landano;
alkovo-sekreto, alkov-sekreto; arbaro-vojeto, arbar-vojeto;
aŭtuno-mateno, aŭtun-mateno; biblio-citaĵo, bibli-citaĵo;
botelo-biero, botel-biero; brasiko-folio, brasik-folio;
bremsado-distanco, bremsad-distanco; butero-biskvito,
buter-biskvito; ĉevalo-piedo, ĉeval-piedo; detruo-manio,
detru-manio; divano-remburo, divan-remburo; doktoro-titolo,
doktor-titolo; duona-konsente, duon-konsente; eduko-eraroj,
eduk-eraroj; edzino-laboroj, edzin-laboroj; erao-komenco,
era-komenco; fabriko-sireno, fabrik-sireno; facila-anime,
facil-anime; gastejo-mastrino, gastej-mastrino; gazeto-legado,
gazet-legado; genuo-artiko, genu-artiko; hararo-aranĝo,
harar-aranĝo; infano-ĝardeno, infan-ĝardeno; instruo-nivelo,
instru-nivelo; kalkulo-eraro, kalkul-eraro; kemio-vortaro,
kemi-vortaro; kolbaso-tranĉaĵo, kolbas-tranĉaĵo;
komenco-litero, komenc-litero; komerco-agento, komerc-agento;
koncerto-programo, koncert-programo; kontoro-meblaro,
kontor-meblaro; kontrolo-kalkulo, kontrol-kalkulo;
kopio-papero, kopi-papero; korsaĵo-butono, korsaĵ-butono;
kvarono-minuto, kvaron-minuto; labori-kapabla, labor-kapabla;
laboro-partio, labor-partio; lanterno-simila, lantern-simila;
letero-papero, leter-papero; liceo-studento, lice-studento;
linio-komenco, lini-komenco; magneto-bobeno, magnet-bobeno;
martelo-tenilo, martel-tenilo; mateno-prediko, maten-prediko;
mezuro-rubando, mezur-rubando; mielo-monato, miel-monato;
migdalo-siropo, migdal-siropo; milito-minaco, milit-minaco;
motoro-boato, motor-boato; mustardo-barelo, mustard-barelo;
muzeo-gvidisto, muze-gvidisto; muziko-instruo,
muzik-instruo; naturo-sciencoj, natur-sciencoj;
okule-videbla, okul-videbla; oleo-pentraĵo, ole-pentraĵo;
oranĝo-kolora, oranĝ-kolora; orelo-inflamo, orel-inflamo;
orgeno-koncerto, orgen-koncerto; papero-tranĉilo,
paper-tranĉilo; piano-ludisto, pian-ludisto; piede-iranto,
pied-iranto; popolo-denseco, popol-denseco; preĝejo-fervora,
preĝej-fervora; prononco-eraro, prononc-eraro; reklamo-panelo,
reklam-panelo; respondo-kupono, respond-kupono; ricevo-atesto,
ricev-atesto; seruro-riglilo, serur-riglilo; sabato-vespere,
sabat-vespere; sigelo-scienco, sigel-scienco; signalo-respondo,
signal-respondo; skandalo-gazeto, skandal-gazeto;
somero-ĉapelo, somer-ĉapelo; spindelo-maŝino, spindel-maŝino;
stomako-doloroj, stomak-doloroj; sukero-prenilo,
suker-prenilo; ŝoseo-riparo, ŝose-riparo; tabako-odoro,
tabak-odoro; tamburo-frapilo, tambur-frapilo; tereno-ondaĵo,
teren-ondaĵo; trafiko-polico, trafik-polico; vaporo-kaldrono,
vapor-kaldrono; vokalo-prononco, vokal-prononco;
vespero-prediko, vesper-prediko; vualo-trenaĵo, vual-trenaĵo.

6.2.2.4. Ekzemploj kun *kvar*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n A n - n A n* kaj *n n A' - n A n*.

adicio-rezulto, adici-rezulto; aktiveco-raporto,
aktivec-raporto; akvarelo-pentristo; akvarel-pentristo;
delikata-statura, delikat-statura; ĝentileco-formuloj,
ĝentilec-formuloj; historio-kritiko, histori-kritiko;
kanibalo-festeno, kanibal-festeno; konscienco-riproĉoj,
konscienc-riproĉoj; kriminalo-romano, kriminal-romano;

manuskripto-kontrolo, manuskript-kontrolo; opinio-esprimo; opini-esprimo; pantalono-butono, pantalon-butono; perspektivo-eraro, perspektiv-eraro; profesoro-titolo, profesor-titolo; propagando-kampanjo, propagand-kampanjo; rapideco-ŝanĝilo, rapidec-ŝanĝilo; sedimento-analizo, sediment-analizo; sonorilo-muldisto; sonoril-muldisto; telefono-numero, telefon-numero; telegramo-portisto, telegram-portisto; tualeto-spegulo, tualet-spegulo; Esperanto-uzanto.

6.2.2.5. Ekzemploj kun *kvin*-silaba *f r o n t*-elemento. Prononco-skemoj: *n n n A n - n A n* kaj *n n n A' - n A n*.

aeroplano-piloto, aeroplan-piloto; amoniako-odoro, amoniak-odoro; ceremonio-ĉapelo, ceremoni-ĉapelo; cirkumferenco-radio, cirkumferenc-radio; inĝeniero-diplomo, instruistaro-kongreso, instruistar-kongreso; konjugacio-sistemo, konjugaci-sistemo; literaturo-juvelo, literatur-juvelo; lokomotivo-garaĝo, lokomotiv-garaĝo; restoracio-vagono, restoraci-vagono;

6.2.3. Vort-kunmetoj kun *kvar*-silaba *post*-elemento.

6.2.3.1. Ekzemploj kun *du*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *A n - n n A n* kaj *A' - n n A n*.

ago-maniero, ag-maniero; aĝo-diferenco, aĝ-diferenco; amo-rendevuo, am-rendevuo; bokso-ĉampiono, boks-ĉampiono; borso-makleristo, bors-makleristo; danco-kunulino, danc-kunulino; domo-posedanto, dom-posedanto; festo-tualeto, fest-tualeto; flugo-rapideco, flug-rapideco; fajro-brigadisto, fajr-brigadisto; filmo-festivalo, film-festivalo; fumo-analizo, fum-analizo; ĝojo-radianta, ĝoj-radianta; hejme-sidemulo, hejm-sidemulo; kapo-kuracisto, kap-kuracisto; klaso-kamarado, klas-kamarado; kremo-ĉokolado, krem-ĉokolado; lumo-energio, lum-energio; maro-anemono, mar-anemono; mondo-historio, mond-historio; naĝo-veturilo, naĝ-veturilo; norde-okcidente, nord-okcidente; paco-konferenco, pac-konferenco; pagi-kapableco, pag-kapableco; pensi-maniero, pens-maniero; perlo-koliero, perl-koliero; plumo-industrio, plum-industrio; poŝto-inspektoro, poŝt-inspektoro; provo-ekzemplero, prov-ekzemplero; puno-laborado, pun-laborado; rizo-muelejo, riz-muelejo; sango-cirkulado, sang-cirkulado; savo-armeano, sav-armeano; skio-ĉampiono, ski-ĉampiono; ŝipo-asocio, ŝip-asocio; sono-reĝisoro, son-reĝisoro; studo-periodo, stud-periodo; tero-kultivisto, ter-kultivisto; tolo-pantalono, tol-pantalono; varmo-energio, varm-energio; vento-muelilo, vent-muelilo; uzo-maniero, uz-maniero; vino-komercisto, vin-komercisto; vivo-cirkonstancoj, viv-cirkonstancoj; vorto-elemento, vort-elemento.

6.2.3.2. Ekzemploj kun *tri*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n A n - n n A n* kaj *n A' - n n A n*.

atomo-energio, atom-energio; brioĉo-piramido, brioĉ-piramido; citrono-limonado, citron-limonado; ĉapelo-posedanto, ĉapel-posedanto; fabriko-direktoro; fabrik-direktoro; facile-komprenebla, facil-komprenebla; festeno-parazito, festen-parazito; ĝardeno-laboriloj, ĝarden-laboriloj; komune-interesa, komun-interesa; konfeso-konfidencoj, konfes-konfidencoj; konstruo-entrepreno, konstru-entrepreno;



laboro-cirkonstancoj, labor-cirkonstancoj; motore-kultivado, motor-kultivado; muziko-festivalo, muzik-festivalo; pasporto-oficejo, pasport-oficejo; preparo-maniero, prepar-maniero; prunelo-arbetaĵo, prunel-arbetaĵo; naturo-esploristo, natur-esploristo; observo-kapableco, observ-kapableco; orelo-kuracisto, orel-kuracisto; parado-uniformo, parad-uniformo; partio-politiko, parti-politiko; patento-oficejo, patent-oficejo; piedo-varmigilo, pied-varmigilo; piano-fabrikisto, pian-fabrikisto; rezisto-kapableco, rezist-kapableco; signalo-sonorilo, signal-sonorilo; spirito-parenceco, spirit-parenceco; ŝoseo-konstruado, ŝose-konstruado; trafiko-reglamento, trafik-reglamento; trenaĵo-portantino, trenaĵ-portantino; vojaĝo-aventuroj, vojaĝ-aventuroj.

6.2.3.3. Ekzemploj kun *kvar*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n A n - n n A n* kaj *n n A' - n n A n*.

alkoholo-malpermeso, alkohol-malpermeso; hospitalo-organizo, hospital-organizo; mirabelo-distilanto, mirabel-distrilanto; rapideco-indikilo, rapidec-indikilo; Esperanto-fundamento.

6.2.3.4. Ekzemploj kun *kvin*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n n A n - n n A n* kaj *n n n A' - n n A n*.

aŭtomobilo-riparejo, aŭtomobil-riparejo; delegitaro-konferenco, delegitar-konferenco; lokomotivo-kondukisto, lokomotiv-kondukisto; situacio-politiko, situaci-politiko.

6.2.4. Vort kunmetoj kun *kvin*-silaba *post*-elemento.

6.2.4.1. Ekzemploj kun *du*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *A n - n n n A n* kaj *A' - n n n A n*.

amo-korespondado, am-korespondado; ĉefo-inĝeniero, ĉef-inĝeniero; filmo-demonstracio, film-demonstracio; koro-operacio, kor-operacio; poŝto-oficejestro, poŝt-oficejestro; provo-materialo, prov-materialo;

6.2.4.2. Ekzemploj kun *tri*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizo. Prononco-skemoj: *n A n - n n n A n* kaj *n A' - n n n A n*.

apaĉo-literaturo, apaĉ-literaturo; linio-infanterio, lini-infanterio; konstruo-materialo, konstru-materialo; patento-ekspluatado, patent-ekspluatado; stomako-operacio, stomak-operacio.

6.2.4.3. Ekzemploj kun *kvar*-silaba *f r o n t*-elemento, sen kaj kun elizio. Prononco-skemoj: *n n A n - n n n A n* kaj *n n A' - n n n A n*.

instruado-psikologio, instruad-psikologio; kolonio-ekspluatado, koloni-ekspluatado; procesio-partoprenantoj, procesi-partoprenantoj.

## *FIN-PAROLO*

Por atingi laŭ-eble saman kaj korektan elparoladon de Esperanto fare de divers-naciaj homoj en la tuta mondo, estas necese, ke lernantoj kaj praktikantoj de tiu universala inter-lingvo ĉiam atentu pri:

a) ĝusta kaj klara prononcado de la vokaloj, precipe de la vokaloj *e* kaj *o*, vaste (aŭ malvaste) prononcotaj en fermitaj ( aŭ nefermitaj) silaboj;

b) ĝusta kaj klara prononcado de la konsonantoj, nome de la l a b i a l o j (b, p, f, v, m,) de la d e n t a l o j (d, t, s, c, z, dz, r, l, n), de la g i n g i v a l o j (ŝ, ĉ, ĵ, ĝ,) kaj de la g u t u r a l o j (k, g, h, ĥ);

c) ĝusta silabo-akcentado en radik-vortoj, en derivitaj vortoj kaj en kun-metitaj vortoj. Por faciligi al legantoj tuj rekoni la front-elementon kaj la post-elementon en du-elementaj kaj pli-ol-du--elementaj vort-kunmetoj, estas rekomendinde inter-meti lig-streketon, eĉ se oni opinias, ke tio "malbeligas" la aspekton de la teksto. Multaj lernantoj kaj lernintoj hezitas je la unua alrigardo de certaj vortoj iom similaj, kaj ne povas distingi tuj, ĉu temas pri radik-vorto, aŭ derivita vorto aŭ kun-metita vorto; por demonstri ĉi-tion, jen kelkaj tipaj ekzemploj: andanto, amanto (= am/anto ); soldato, batato (= bat/ato), virkato (= vir-kato, vira kato);ampero, ŝtalero (= ŝtal/ero, ŝtala ero), surtera (= sur-tera); ferdeko, kvardeko (= kvar-deko); fervoro, ferlado (= fer-lado); girlando, fremdlando (= fremd-lando, fremda lando); membrano, gentano (= gent/ano), ŝaflano (= ŝafo-lano, ŝafa lano), fanfaro, bonfaro (= bono-faro), bovaro (= bov/aro); laktuko, poŝtuko (= poŝo-tuko); pardono, kvarono (= kvar/ono), ludono (= luo-dono); arkebuzo,komunuzo (= komuna uzo), monrifuzo (= mono-rifuzo); instrumento, instruanto (= instru/anto), instrufako (= instruo-fako); kartilago, julitago (= julio-tago); marcipano, kamparano (= kamp/ar/ano ); buterpano (= butero-pano, buterumita pano); monopolo, monofero (= mon-ofero, mono-ofero); pergameno, interveno (inter-veno),tekunveno (= teo-kunveno), kaj tiel plu. - Tiu-rilate, estas oportune memorigi pri la saĝa averto de d-ro Zamenhof: "Entute, mi konsilas p l i uzadi ĉiam vort-formojn s i m p l a j n, anstataŭ k u n - m e t i t a j . Kun-metado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana; kaj, al ĉi-tiu lingvo, ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj. Sed en n i a lingvo, la vortoj pleje estas p l i naturaj kaj p l i bon-sonaj, se ili estas *ne* kun-ligitaj, sed uzataj a p a r t e."

*BIBLIOGRAFIAJ REFERENCOJ.*


Fundamento de Esperanto, paĝoj 1,7, 13, 22 kaj 27
Plena Gramatiko de Esperanto (Ĉapitro "Fonetiko").
Kurso pri Esperanto-fonetiko, de d-ro J.C.Wells
Fundamenta Esperanto-prononco, de Tacuo Huĝimoto.
Prononca alfabeto, de A.M.Brya.
Esperanto -ĉu lingvo klara? (Artikolo en "Scienca Revuo" de 20.2.67).
Kriterioj pri Esperanto laŭ-eble simpla (Artikoloj en "Esperanto" /UEA n 764 kaj "Heroldo de Esperanto" n° 1478).
Esperanta prononco (de prof. John Adcock) kaj Aŭdo-zonoj en muziko kaj lingvistiko (de d-ro Stojan Guĝev). - Artikoloj en "Scienca Revuo" de 5.9.70.
The loom of language, de Frederick Bodmer. Eldonejo: Allen & Unwin, London. - Germana traduko: traduko: Die Sprachen der Welt. Eldonejo Kiepenheuer & Witsch, Köln/Berlin, 1955.






## 80-JARA JUBILEO DE LA PREZIDANTO DE I.U.E.F.

*Ho jes, dum via longa vivo eĉ ne tagon*
*vi paŭzis en laboro pormovada.*
*Vi donis ĉion; plumon, vorton, agon*
*Kaj vian koron mem vi donis, ADA!*

As.Grigorov.

La patriarko de la Esperanto-movado en Bulgario, Atanas D.Atanasov - ADA, atingis sian okdekjaran aĝon. La datreveno de lia naskiĝo estas festo ne nur por li, sed ankaŭ por ĉiuj bulgaraj esperantistoj, por la tuta bulgara Esperanto-movado. La plimulto el la nuntempaj bulgaraj pioniroj kaj batalantoj por Esperanto estas liaj rektaj aŭ nerektaj disĉiploj. Se la internacia lingvo sukcesis penetri ĝis la plej profundaj tavoloj de nia popolo, se la bulgara movado sukcesis elbredi plejadon da talentaj Esperanto-poetoj, beletristoj, oratoroj, gramatikistoj k.c. - tiu ĉi prospera stato de nia movado estas grandparte verko de nia pioniro kaj veterano Atanas D. Atanasov. Sed lia agado kaj verkado havas ne nur lokan, nacian karakteron. Lia rolo en la internacia Esperanto-movado akiris mondskalan signifon, liaj filologiaj kaj lingvistikaj konceptoj estas respektataj de ĉiuj nuntempaj mondlingvanoj, kaj li mem estas internacie konata kiel elstara esperantologo.

Lia vivo estas grandparte la historio mem de la Esperanto-movado en nia lando depost la 1908. Sesdek kvin jarojn da sindona, senlaca, fervora kaj entuziasma laboro kaj batalo por Esperanto! Atanas Danĉev Atanasov naskiĝis la 12-an de februaro 1892. en Sofio, en familio de oficisto. La unuan renkonton kun Esperanto li havis en la 1904., sed la unuajn lecionojn de Esperanto li ricevis en la 1905. En la 1908. li skribas leteron al Zamenhof kaj aliĝas al la Tutmonda Esperanto-Movado (registrita sub n-ro 21181). Post du monatoj li ricevis respondon de la Majstro kun libroj kaj gazetoj. Ankoraŭ gimnaziano, li konsciis la neceson varbi novajn adeptojn por la internacia